# 2. En sveda lernejo

Estas aŭtuno en sveda lernejo. Katrina laboras, kaj la laboro plaĉas al ŝi. Ŝi estas instruisto. Ŝi instruas en granda lernejo. Estas multaj infanoj en la lernejo. La infanoj lernas, kaj Katrina instruas. Ŝi ŝatas instrui. Kelkaj infanoj ŝatas lerni, aliaj ne. Katrina estas juna. Ŝi estas nova instruisto. La lernejo estas la unua laborejo de Katrina. Ŝi ŝatas labori en la lernejo. Nun estas aŭtuno, kaj Katrina ŝatas labori.

En la klaso de Katrina estas dudek kvin infanoj. Dek kvin estas knaboj kaj dek knabinoj. La infanoj vivas en la sveda urbo Gotenburgo. Ankaŭ Katrina vivas en Gotenburgo, kaj ŝi laboras en gotenburga lernejo. La familioj de la infanoj venas el multaj landoj. Nun ili vivas en Svedio, sed ilia origino estas en la tuta mondo. Kelkaj el ili vivas en Gotenburgo de longa tempo, aliaj de mallonga. Kelkaj estas originaj gotenburganoj.

Katrina estas svedino. Ŝi nun vivas en Gotenburgo, sed origine ŝi venas el malgranda sveda urbo.

Post la laboro Katrina ofte estas laca. De la lernejo ŝi reiras al la loĝejo. Tie ŝi manĝas kaj ripozas. Poste ŝi devas pensi pri morgaŭ. Ŝi devas bone plani. Instrui estas bona kaj grava laboro. La infanoj plaĉas al ŝi. Katrina ŝatas esti instruisto, sed ŝi estas laca instruisto. La labor-tagoj estas longaj, sed la tagoj por ripozi estas mallongaj. Kaj la aŭtunaj tagoj en Gotenburgo ofte estas grizaj.